# Esperantista infaneco en la faŝisma Italio

Interparolo kun Carlo Minnaja



La esplorprojekto *Militrakonto* celas kolekti, diskonigi kaj studi ampleksan fonto-korpuson pri la rilato inter Esperanto kaj la dua mondmilito. La abundo, diverseco kaj bunteco de la vivitineroj kaj engaĝiĝoj de Esperantistoj laŭlonge de la mondskuaj eventoj estas hodiaŭ plej ofte nekonataj de la nunaj generacioj. Nia celo estas konsekvence ne nur raporti pri historiaj faktoj sed ankaŭ ekanalizi kiel la postmilitaj samideanoj konstruis iom post iom specifan, transnacian imagon de la okazaĵoj kaj pli larĝe integris ilin en la komunuman memoron.

Multaj vivrakontoj aperis en libroj kaj revuoj, kaj la temo restas ĝis hodiaŭ populara en la beletro. Sed tiu sento estas ankaŭ perceptebla en la aktiva memoro de esperantistoj kiuj naskiĝis antaŭ – aŭ dum – la milito kaj kies vivosperto kaj familia historio estis profunde influitaj de la milita tragiko. Tial *Militrakonto* inaŭguras ĉi tie novan serion da fonto-kolektado en la formo de intervjuoj. La unuan ni danke ŝuldas al Carlo Minnaja, kiu afable kaj kunlabore konsentis respondi al niaj demandoj. La atesto liveras al la leganto kvanton da pripensindaj faktoj pri la ĉiutaga vivo de esperantlingva familio en Romo, pri la kompleksaj rilatoj de la Esperanto-movado kun la tiama faŝisma reĝimo, pri la pluaktivado malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj kaj pri la elmilitiĝo en la okuloj de konvinkita esperantisto.

Temas pri kolektiva projekto, kies unua fazo baziĝas sur reta prezento de sliparo en mondmilito.hypotheses.org, kaj kiu bonvenigas ĉies kunlaboron.

*Javier Alcalde, Pascal Dubourg Glatigny*

***Vi kreskis en esperantista familio. Kiel vi priskribus vian hejmon kaj vian familion?***

Mia familio, itala, estis etburĝa: paĉjo Luigi Minnaja (1899-1974), kiu vivis en sud-itala regiono, estis rekrutita 18-jara en 1917 kaj sendita al la milito kontraŭ Aŭstrio-Hungario ĉe la norda fronto; ĉe malmobilizo unu jaron poste, ankoraŭ kun la kaporala uniformo li estis lokita en Romo ĉe la fako de militpensioj de la Ministerio de la Trezoro kaj restis en ĝi kiel ŝtata oficisto dum sia tuta labora kariero; panjo Carolina Minio-Paluello (1903–1984) estis magistro pri matematiko kaj fiziko,

antaŭe instruistino en mezgrada lernejo, post la edziniĝo, en 1937, dommastrino. La sola enspezo estis la salajro de paĉjo. La domo en kiu mi naskiĝis estis tute nova kaj la familioj tie loĝantaj estis diversspecaj, sed ĝenerale etburĝaj.

***Kiel viaj gepatroj esperantistiĝis? Ĉu ili renkontiĝis pere de Esperanto?***

Mia patrino, tiam Carolina Minio (post 1929 Carolina Minio-Paluello sekve de adoptiĝo) iĝis esperantistino en 1922 en Venecio, kie ŝi tiam loĝis, ĉe vespera prelego de admiralo Alberto Alessio; je ŝia entuziasma reveno hejmen tiun vesperon ŝia patro elfosis el sia biblioteko gramatikon de Esperanto. Ŝia patro, Michelangelo Minio, estis matematikisto kaj natursciencisto kaj interesita pri planlingvoj, li estis membro de Academia pro Interlingua ([tiama nomo de] Latino sine flexione), fondita de la kreinto de la lingvo, Giuseppe Peano. De tiam mia patrino ĉiam praktikis la lingvon, verkis artikolojn, gvidis kursojn, rolis en la komedio "Ŝakludado" ludita en 1923 en Venecio dum la "Konferenco por komuna lingvo en komerco kaj turismo".

Mia patro, laborante ĉe la ministerio en Romo kiel fraŭlo kun malproksima familio, interesiĝis pri pluraj lingvoj kaj en 1926 trafis al esperanto-kurso ĉe la Popola Universitato (ĝin gvidis prof. Elio Migliorini) kaj ekde tiam iĝis aktiva esp-isto en Romo. En 1933 li iris viziti la E-grupon en Venecio kaj tie ekkonis f-inon Carolina Minio-Paluello. Prepare al la UK en Romo en 1935 li kaj ŝi kune tradukis la Gvidlibron pri Romo; li estis la sekretario de la LKK de la UK. La 21-an de Aprilo 1937 ili geedziĝis en Venecio kaj venis loĝi en Romo; plene interkonsente ili decidis eduki la infanojn kiel denaskajn esperantistojn.

En la ekstera esperantista vivo post la geedziĝo aperis ĉiam nur mia patro, kaj panjo restis ĉiam malantaŭ la kulisoj, kvankam plene kunlabora. Post la translokiĝo de Prof. Migliorini al Napolo mia patro iĝis IEL/UEA-delegito en Romo; en la 1950aj post rezigno de prof. Canuto li iĝis ĉefdelegito de UEA por Italio.

***Ĉu en la lernejo kaj kvartalo oni sciis ke vi kaj via frato estas denaskaj E-parolantoj? Kiel la homoj reagis?***

Ĉar paĉjo estis la IEL/UEA-delegito, ĉiuj esperantistoj trapasantaj Romon vizitis mian familion, kiu fariĝis fama, ĉar mia frato kaj mi estis tiam la solaj denaskaj esperantistoj en tuta Italio. Esperanto kaj esperantistoj estis tute normalaj por mi. Ĉirkaŭuloj bone sciis pri nia

dulingveco, kaj normale akceptis tion. Leteroj venis el multaj landoj kun fremdaj poŝtmarkoj, tio interesis la najbarojn.
Esperanto estis populara en Italio jam en la 1920aj jaroj; en Milano unu strato preskaŭ en la centro estis nomita laŭ Zamenhof, kursoj okazis ĉe la bazlernejo.

***Decidi en Italio en 1940, ke la infanoj lernu denaske esperanton ne estas neŭtrala decido. Ĉu via patro iam esprimiĝis pri tiu elekto, aŭ ĉu ĝi estis por li natura, sendepende de la cirkonstancoj?***

La decido estis de ambaŭ, jam pri mia frato Nicola Minnaja, naskiĝinta la 9-an de Januaro 1938. Laŭ tio, kion mi ĉiam perceptis, Esperanto estis tute natura; cetere, escepte de la loĝantoj en la sama domo aŭ la geparencoj, ĉiuj aliaj konatoj aŭ oftaj vizitantoj estis esperantistoj, ja mia patro agadis en la Roma grupo jam dek du jarojn.

***Kontraŭe al aliaj reĝimoj la italaj faŝistoj ne rekte persekutis la movadon, foje konsiderante Esperanton kiel pluevoluon de la latina, kiu povas servi la disvastigon de la tiutempa ideologio. Kia estis la rilato de la faŝisma reĝimo kun la esperantistoj? Ĉu oni toleris ilin senescepte? Kiel reagis la esperantistoj al tiu ĉi reĝimo?***

Dum la faŝista tempo (1922–1943) Esperanto estis rigardata de la itala registaro kiel bona propagandilo de la konkeroj kaj sukcesoj de la reĝimo, opozicie al la grandaj lingvoj (franca kaj angla); en aprilo 1935 komenciĝis la esperantlingvaj dissendoj de Radio Roma por eksterlando, kun tekstoj liverataj de la Ministerio por Gazetaro kaj Propagando; en la tuj sekva aŭgusto okazis en Romo la UK "kun la alta aprobo de la *Duce*", kio tiam estis nepraĵo. Post la milito de Italio kontraŭ Etiopio (1935–1936), la registaro (iu ministro aŭ funkciulo, verŝajne) petis, ke la Itala Federacio alvenigu el eksterlando gratulmesaĝojn pro la venko de Italio kaj kreiĝo de la Imperio de Etiopio. La esperanto-movado en Italio tiutempe estis pli patriote naciisma ol internaciisma, aperis pluraj tradukoj al esperanto de gravaj verkoj, inkluzive de du (ne gravaj) de Mussolini. Aliflanke, kiam estis restrukturitaj la komunumaj administracioj [ekde] 1926 kaj ĉiuj urbestroj elektitaj de la popolo estis anstataŭataj de funkciuloj nomumitaj de la registaro, estis elpostenigitaj ankaŭ almenaŭ du urbestroj esperantistaj, [la socialisto Angelo Filippetti] en Milano kaj [la katoliko Giovanni Saggiori] en urbeto Fossò inter Padovo kaj Venecio.



Sceno el *Roma città aperta* (*Romo, malferma urbo*), filmo de Roberto Rossellini (1945). Fonto: *Vikipedio*

***Ĉu ĉiuj esperantistoj akceptis la submetiĝon de Esperanto al faŝismo aŭ ĉu okazis internaj debatoj tiurilate? Ĉu ankaŭ la nacia revuo esprimis favoron al faŝismo?***

Rigardo al la oficiala gazeto de la Federacio aŭ de la eldonisto Antonio Paolet montras, ke neniam aperis artikoloj kontraŭ la registaro, male eĉ tute favoraj; la nomo mem ŝanĝiĝis, de *L'Esperanto* al *Itala Esperanto-Revuo* kaj poste al *Rivista Italiana di Esperanto*; tre verŝajne ĉi tiu ŝanĝo al itallingva titolo estis trudita aŭ konsilita de iuj oficialuloj, en la kampanjo de italigo de multaj vortoj kaj nomoj. Ekzemple, la tuta terminologio de la roloj en futbala teamo, kiu antaŭe estis angla, estis italigita, kaj samo okazis por la terminologio pri teniso; la terminaro pri fervojoj, kiu antaŭe estis franca, estis italigita; pluraj familiaj aŭ geografiaj nomoj en la landlimaj regionoj, iam francaj aŭ germanaj aŭ slovenaj, estis italigitaj.

Aperis eĉ artikolo en la revuo diranta, ke la E-movado devas favori la eksportadon de faŝismo al aliaj landoj. Cetere la prestiĝo de Mussolini internacie estis tre alta en Hungario, Germanio, Britio, kaj en Italio

ekde 1930 komenciĝis periodo de ĝenerala konsento kun faŝismo pro ĝiaj sociaj konkeroj. La Itala E-Federacio (IEF) balanciĝis inter katolikoj kaj socialistoj, sed neniam kontraŭis la reĝimon. Kontraŭfaŝistoj estis procesataj kaj kondamnataj al karcero aŭ al izoliĝo en necentraj lokoj, sed laŭ mia scio neniun esperantiston trafis tiuj kondamnoj.

***Ĉu ili estis bonŝancaj aŭ ĉu tiaj kontraŭfaŝistoj tute ne ekzistis?***

Post la elektoj en 1925 oficiala opozicio ne plu ekzistis; la ŝtato kaj ĝiaj strukturoj identiĝis kun la partio; kontraŭfaŝistoj aŭ agis kaŝe, aŭ translokiĝis al Svislando, Francio, Sovetio. Laŭ mia scio neniu esperantisto translokiĝis; tamen je certa momento itala civitano ne povis membri en eksterlandaj asocioj, kaj tio likvidis la delegitojn de UEA/IEL en Italio, kiuj ne plu aperis en la koncernaj Jarlibroj.

***Kiel influis la movadon la rilato inter Italio kaj Germanio?***

Ĉio forte ŝanĝiĝis kiam intensiĝis la alianco kun la hitlera Germanio, kiu likvidis la esperanto-movadon en 1936 aŭ trudis al ĝi la "samdirektiĝon" kun la pozicio de la nazia partio. En Italio la kontraŭjudaj leĝoj estis promulgitaj ekde printempo 1938, la stratnomo de Zamenhof estis ŝanĝita, la pozicio de la reĝimo fariĝis subtile kontraŭa al esperanto: estis malpermesitaj la naciaj E-kongresoj en 1936 kaj 1937, la kongreso en Vicenza en 1938 havis la temon "Esperanto kiel instrumento de turisma propagando"; la organizo de la planita kongreso en Torino en 1939 estis forte malhelpata, tiel ke fine oni rezignis pri ĝi; estis fermita la nacia revuo "por ŝpari paperon". Nek pri efektivaj personaj persekutoj de esperantisistoj nek pri devigo likvidi E-asociojn mi aŭdis.

***Kiel reagis la Federacio al la la kontraŭjudaj leĝoj?***

La Federacio konsilis al hebreaj anoj ne plu kotizi, tiel ĝi povis deklari al la polico, ke ne estas hebreaj membroj en la esperantistaj vicoj, tiel ili do ne estis deklaritaj. La kontrolo de la polico sur la kulturaj asocioj estis peza, estis formulo en kiu la polico demandis la lokajn aŭtoritatojn, ĉu iu asocio (en nia kazo: la esperanto-grupo) povas esti forĝejo de kontraŭŝtata agado; pri konkreta okazo en Toskanio la respondo unu jaron estis "NE", kaj la postan jaron "por la momento, NE".

***Hebreoj ne estis deklaritaj, sed ĉu ili plu partoprenis la movadon, havis kontaktojn kun esperantistoj? Ĉu iuj esperantistoj kaŝis/helpis hebreojn?***

La hebreoj rezidantaj en Italio estis censitaj en julio 1938, tuj antaŭ la antisemitaj leĝoj; ili estis ĉ. 1 promilo de la loĝantaro. Certe esperantistoj, samkiel aliaj romaj civitanoj, kaŝis hebreojn, ankaŭ mia familio dum certa tempo (ĉ. oktobro 1943, kiam estis la ĉefa nazia razio en Romo). Laŭ mia scio ne estis kontraŭjudaj esperantistoj.

***Fakte la movado laŭgrade silentiĝis post 1936, sed ĉu la esperantlingvaj radio-dissendoj de EIAR (Ente italiano per le audizioni radiofoniche) plupropagandis eksterlanden?***

La radiodissendoj restis konstantaj ĝis aŭgusto 1942; ili okazis dufoje ĉiusemajne, unu el tiuj estis pri politiko, kaj forte sekvis la linion de la reganta partio, aŭ tra rektaj tradukoj de liveritaj tekstoj aŭ tra resumoj; ekde 1938 estis ĉiam traktite pri la internaciaj tensioj, ekde la komenco de la milito en Eŭropo estis ĉiam raportite pri la okazaĵoj sur la batalkampoj; en la lastaj tempoj temis preskaŭ nur pri militbultenoj de la itala stabejo (“Generalejo” estis la uzata termino). Registraĵoj estis detruitaj, longe post la milito. Mia patro, kiu estis unu el la du parolistoj (la alia, ĉefa, estis Ascenzio Blasimme) gardis ĉiujn siajn tekstojn (proksimume duonon de la tuto, komence de 1936); nun ili estis rekonstruitaj antaŭ jardudeko el aĉa tajpokopio far d-ro Antonio De Salvo cele al publikigo, kiu, malgraŭ la promeso de la eldonisto, ne okazis. Tiun rekonstruon mi (kaj De Salvo) posedas. Utilus historiisto havanta tempon por trastudi tiun materialon, ĝi estas ege interesa.

***La ĉiutaga realeco de la milito envenis Italion tre malfrue. Aliancanoj kaj malamikoj de la lando rapide ŝanĝiĝis kaj plurfoje evoluigis la geografian dividon de la lando. Kiel vi memoras tiujn eventojn? Kiun konsekvencon ili havis en via ĉiutaga vivo?***

La milito eksplodis en Eŭropo en 1939, sed Italio deklaris ĝin (kontraŭ Francio kaj Britio) nur la 10-an de junio 1940; dum plenaj tri jaroj ĝi okazis longe for de la itala teritorio, kaj la itala armeo operacis en Libio, Etiopio (tiam italaj kolonioj), Francio, Greklando, Albanio, Jugoslavio, Rusio. En iu geografia ludo mi memoras, ke estis klasata kun la koloroj de Italio ankaŭ parto de Slovenio kun ĉefurbo Ljubljano, kie la itala ŝtato nomumis “reĝo de Kroatio” kun la nomo Tomislavo II iun anon de la familio Savoia, kiu estis la reĝa familio en Italio (kaj kiu neniam iris tien).

Mi naskiĝis la 19-an marto 1940 (mia frato Nicola la 21-an januaro 1938); militon mi perceptis ekde ĉ. du kaj-duon-jaroj, ĉar miaj tri onkloj estis oficiroj, mi memoras angorajn telefonadojn inter mia patrino kaj mia onklino. Unu onklo estris ŝipon en la Mediteraneo, alia pilotis super Mediteraneo, tria estis per sia propra privata aviadileto esplorpiloto enkadrigita en la tera armeo. En mia konstruaĵo loĝis oficiro kun infanoj samaĝaj kiel mi kaj mia frato kaj du hebreaj familioj, kun preskaŭ samaĝaj infanoj. En mia familio oni ĉiam aŭskultis la radion kun la sciigoj pri la milito.

***Kiun radion? Ĉu oni aŭskultis ankaŭ eksterlandajn radiojn?***

Nur la italan; la radio-aparato, laŭ rakonto de miaj gepatroj, estis donaco de iu aŭstralia esperantisto, kiu, ĉe rehejmiĝo post longa restado en Romo, lasis ĝin al ili en 1937.

***Ĉu vi memoras pri aliaj konkretaj perceptoj pri la milito?***

Tre precizan percepton pri militaj bataloj mi havis en novembro 1942, kiam disvastiĝis kruda sciigo: “Ni perdis Afrikon”. Nur poste mi rilatigis tion al la batalo ĉe El Alamein, kiam la itala fronto, post heroa rezisto, estis frakasita kaj nenio plu opoziciis al invado de Italio far la malamikaj trupoj (anglimperiaj-usonaj-marokaj).

Miaj gepatroj neniam interesiĝis pri politiko, tamen eĉ mia patro, ĉiam ekstreme pacema, diris, ke se la patrujo estas militanta, nia devo estas stari je ĝia flanko.

***Ĉu temis pri ĝenerala sinteno en la socio? Ĉu laŭ multaj homoj faŝismo kaj patriotismo povis esti senrilataj? Ĉu vi memoras homojn kiuj pensis alimaniere?***

Jam ekde la fino de la 1920-aj jaroj la ŝtato identiĝis kun la reganta partio kaj patriotismo estis esenca trajto de la komuna vivo. Italio celis esti aŭtonoma pri nutrado (kio ĝi ne estis), tial estis popularaj la fekundigo de marĉaj teritorioj, la “tritikbatalo” por intensigi la kultivadon de gramineoj, la koloniado de Etiopio, kiu iom bremsis la elmigradon al Svislando, Ameriko, Francio, kaj politiko estis konsiderata afero por intelektuloj (Italio havis forte pli ol 50%-an analfabetecon). Tiu idilio inter la popolo kaj la reĝimo iom post iom ŝanĝiĝis, sed fakte nur konekse kun la milito; pri plia aŭ malplia malliberigo de la pensado ĝenerale la

popolo ne zorgis, iuj fabelis pri egalrajteco kaj ekonomia prospero en Sovetio, sed kaŝan opozicion faris nur komunistoj; katolikoj, post la repaciĝo inter la katolika eklezio kaj la itala ŝtato en 1929, iĝis ĝenerale favoraj al la faŝista reĝimo.

***Kiujn memorojn vi havas pri la ĥaosa periodo kiu sekvis la nomumon de Pietro Badoglio kiel ĉefministro?***

Alia tute precize perceptita epizodo estis kiam la vesperon de la 8. sep. 1943 la radio anoncis, ke ekestis armistico inter Italio kaj la uson-anglaj armeaj fortoj. Tio estis funebra momento, ĉar “ni malgajnis la militon”; aliaj festis, ĉar “la milito finiĝis”. Mi estis tri-kaj-duon-jara. Sed la milita fronto, kvankam jam en Italio, estis en ĝia plej suda parto, do mi ne perceptis konkretajn militajn agojn, mia familio trankvile promenis, iris al la parencoj, al la renkontiĝoj de la esperanto-grupo, sendanĝere. Kiam la fronto venis norden kaj disigis la urbon disde la kamparo sude de ĝi, de kie venis plejmulto el la nutraĵoj (tritiko, oleo, betsukero), en Romo la manĝaĵoj estis porciumitaj (almenaŭ dum iu periodo en 1943–1944), estis karto kun kuponoj, kiujn oni poparte fortranĉis ĉiufoje ĉe aĉetado de nutraĵoj. Mi memoras, ke nia familio kun du infanoj rajtis je porcio da lakto, aliaj ne.

Dum somero 1943 mi memoras du pezajn usonajn bombadojn sur Romon kaj la videblajn (“vojmarkajn”) enaerajn bombojn; monatojn poste mi memoras longajn vicojn da tankoj kaj blendaŭtoj kiuj laŭiris la ĉefstraton de mia kvartalo kaj iris norden: germanaj trupoj kaj italaj al ili fidelaj estis retretantaj.

***En la dua parto de la milito, Italio dividiĝis en du ŝtatojn, kio kreis konfuzan situacion. Kiamaniere tiu situacio influis vian ĉiutagan vivon?***

Mi ne perceptis tiam, ke, malgraŭ la armistico subskribita la 8-an de septembro 1943, en oktobro Italio dividiĝis en du partojn kaj du ŝtatajn strukturojn: unu estis ankoraŭ alianca kun Germanio kaj kun germanaj divizioj establitaj en la itala teritorio, sub estrado de Mussolini kaj sub respublikana ŝtata formo (Itala Socia Respubliko, sidejo en Gargnano, vilaĝo ĉe la Garda lago); la alia, kiu, pro la klaŭzoj de la armistico tiam ankoraŭ sekretaj, ekmilitis kontraŭ Germanio flanke/apoge al la francaj-britaj-usonaj aliancanoj, estis sub estrado teoria de reĝo Viktoro

Emanuelo III, sed, ĉar ĉi lasta forkuris al Suda Italio jam konkerita de la angla-usona armeo, la estrado praktika estis de li konfidita al lia filo Umberto, la kronprinco, kiu restis en Romo kun la titolo "luogotenente del Re" (Reĝanstataŭanto). La landlimo inter ĉi tiuj du ŝtatoj koincidis kun la batalfronto, kiu avancis/retiriĝis (laŭ la vidpunktoj) ĉiam pli norden. Mi ja perceptis angoron, kiam en vintro-printempo 1944 (mia memoro de kvar-jarulo estis jam solida) okazis surstrata rastado de civitanoj ankoraŭ militkapablaj far la germanaj trupoj por ilin organizi en sian armeon: mia patro, tiam 45-jara, estis civilulo ne enarmeigita ĉar jam partopreninto en la unua milito, ministeria oficisto, kaj kun du malgrandaj infanoj; li saviĝis el la rastado enkurante en apudan domon: tiun aventuron li rakontis kun spirhalto. Mi perceptis angoron, kiam mi aŭdis pezajn botojn ĉe la ŝtuparplaceto antaŭ nia pordo: germana roto serĉis la du hebreajn familiojn loĝantajn en nia konstruaĵo, en mia familio mem estis kaŝitaj du hebreaj fratoj, sed neniu frapis ĉe ni. Mi ne scias ĉu ili travivis la militon, ili ne estis esperantistoj, sed amikoj de esperantistoj. Rektajn kontaktojn post tiam ni ne plu havis.

***Kaj kio okazis al la hebreaj familioj?***

Mi eksciis poste, ke la hebreaj familioj estis transportitaj save al monaĥinejo far itala mar-oficiro kaj tiel eskapis el rastado de 1259 romaj hebreoj, kiuj, male, estis transportitaj rekte al Auschwitz; el ili revenis nur 16 (la lasta pretervivinto mortis en oktobro 2018).

***Ĉu en via familio konstruiĝis specifaj primilitaj mitoj?***

En la familia tradicio ne konstruiĝis apartaj mitoj; eble humura estas jena anekdoto: mia onklo, piloto de ĉasaviadiloj, kaptita de la germanoj ĉar batalanta en la kontraŭgermana reĝa itala armeo, estis transportata per aŭtomobilo norden. La kunvojaĝantaj germanaj soldatoj volis vidi la lagon de Castelgandolfo (vatikana enklavo en Italio proksime de Romo), parkis la aŭton tute apude de arbo facile grimpebla rande de la muro de la Vatikana enklavo, elaŭtiĝis lasante mian onklon sola en la aŭtomobilo kaj subenpromenis al la lago; kompreneble li eskapis grimpante sur la arbon kaj sin faligante internen de la enklavo, do ne plu kaptebla. Laŭ lia rakonto, tiun naivaĵon la germanaj soldatoj faris intence, por ke li fuĝu.

***Kial laŭ li ili tion faris?***

Ba, certe unu plia kaptito prizorgota estis ĝeno pli ol konkero; cetere ili estis aliancanoj ĝis la antaŭa monato; simple, aliula decido ilin lokis en du kontraŭajn armeojn.

***Ĉu la civitanoj en Romo salutis kontente la usonan armeon?***

La 4-an de junio 1944 la usona armeo eniris Romon, festata de multaj civitanoj kiel amikaj trupoj liberigantaj, sed rigardata malamike de same multaj kiel fremdaj okupaciantoj: malgraŭ la poste konstruita falsa historio favora al la venkintoj, estas menciinde, ke la civitanoj de Romo estis altegprocente favoraj al faŝismo, por kiu Romo estis tre favora scenejo: paroladoj de la Duce de balkono super granda placo urbocentre, novaj sportaj instalaĵoj, tute nova grandioza kvartalo, ministeriaj oficistoj. Tiu favoro pruviĝis en la postaj elektoj dum multaj jaroj, kie la kristandemokrata kaj la dekstra partioj regis la urbon dum preskaŭ duonjarcento, dum aliaj regionoj estis “ruĝaj”. Sed certe estis spontana festo de multegaj personoj kun stelo-striaj flagetoj, kun la iluzio, ke la milito finiĝis. Fakte ĝi finiĝis por Romo, kiu estis tiel rekunigita al la suda kamparo, kiu ĝin nutris. Norde de la ĉefurbo la milito sovaĝis dum pluaj dek monatoj, kun la plej teruraj kruelaĵoj.

***Ĉu inter la esperantistoj estis iu diferenco tiurilate?***

Mi neniam perceptis diferencon inter esperantistoj, kvankam certe ili ja parolis pri la situacio en la urbo.

***Ĉu ankaŭ la italaj infanoj havis rilaton kun la usonaj soldatoj?***

La usonaj soldatoj el la tankoj ĵetis plenmane bombonojn kaj, por ni tiam nekonatajn, maĉgumojn, kiujn la infanoj avide plukis el la stratpavimo. Kelkaj usonaj soldatoj estis filoj de italaj elmigrintoj kaj iom da vortoj en la itala ili konis (cetere ili estis sur itala teritorio jam de aŭgusto 1943, do plurajn monatojn). Amuza historio estas, ke usona generalo iom aplombe alvenigis la tankojn ĝis la ŝtuparo de la baziliko de Sankta Petro, ne sciante, aŭ prifajfante, ke la tuta placo ne estas nur itala posedaĵo, sed samrange posedata de la itala ŝtato kaj de la Vatikano; la postan matenon la Papo ilin elpelis el la placo kaj starigis sentinelbudojn, kaj oni rajtis eniri la placon nur kun permeso trapasi tiun limon, kiu tiel fariĝis limo inter ŝtatoj.

Samtage usonanoj lokis kvar kanonojn por ĉiu ponto, kvankam Romo estis proklamita "aperta urbo", do nesindefenda; tio estis de multaj konsiderata skandalo, ĉar estis neniu neceso defendi la urbon… kontraŭ kiu?

***Ĉu en via hejmo oni parolis pri politiko? Ĉu iam oni rilatigis Esperanton al aparta politika sinteno?***

En mia familio neniam estis parolite pri politiko, kaj Esperanto estis neniam rilatigita al aparta politika sinteno. Partizana aŭ kontraŭfaŝisma agado okazis ĉefe kiam la fronto supreniranta norden atingis Toskanion, do kiam la milito estis jam trapasinta Romon. Kelkaj esperantistoj de norda Italio aktive partoprenis la rezistmiliton, ekz. inĝ Giordano Azzi el Como, socialisto, kiu poste estis ankaŭ estrarano de UEA; Luigi Canali el Como estis en la partizana roto kiu arestis kaj tuj ekzekutis Mussolini dum li estis fuĝanta al Svislando en germana uniformo, la 28-an de aprilo 1945, kiam la milito estis deklarita finita (la 25-an de aprilo), sed partizanaj taĉmentoj ne estis ankoraŭ malmobilizitaj kaj blokis retiriĝojn de germanaj trupoj al Svislando. Kun tiu ekzekuto kolapsis la Itala Socia Respubliko, kaj sur la tuta duoninsulo denove fariĝis la itala regno, sub reĝo Vittorio Emanuelo III (fakte sub la kronprinco, lin anstataŭanta). Italio fariĝis respubliko per la referendumo la 2-an de junio 1946.

***Ĉu postmilite lokanoj intermiksiĝis kun esperantlingvaj aliancanoj en Romo postenitaj? Ĉu tiu amikeco estis publika? Kiel reagis la ne-esperantistaj italoj?***

Kiel aliloke raportite, dum la okupacio de Romo far la aliancanaj armeoj la situacio ne estis trankvila; interalie diskoniĝis faktoj pri brutalaj agresoj kontraŭ virinoj en la kamparo tuj sude de Romo fare de marokanoj apartenantaj al la franca armeo (ankoraŭ nun la vorto "marokano" elvokas malagrablan senton), kaj ni infanoj timis ĉiajn uniformojn. Iun tagon iu sonorigis ĉe nia pordo: ĉu nazio serĉanta kaŝitajn hebreojn? Ĉu marokano kiu volas nin agresi? Panjo tenis strikte nin du infanojn kun granda angoro; prezentiĝis ulo en uniformo, kun pistolo. Ni estis teruritaj: kio okazos al ni? La ulo diris: "Bonan vesperon"; ni sentis saviĝon el ĉiuj timoj, angoroj, duboj: de esperantisto estas nenio timinda. Li estis brita oficiro, evidente li vidis E-ŝildon ĉe nia pordo; poste, dum sia restado en Romo li venis al la kunsidoj de la grupo; alia soldato novzelanda venis al ni kaj amikiĝis kun ni infanoj kaj skribis en la familia gastlibro (lia patro venis al Romo pli ol dek jarojn poste

kaj kun ĝojo rekonis la skribon de sia filo). Esperanto estis forta ligilo inter ni, kiuj tamen konsideris la aliancanajn trupojn ne liberigantoj sed okupaciantoj, kaj ĉi tiuj armeanoj, en lando, kie oni ilin akceptis ne ĉiam kun ĝojo; sed certe usonaj kaj aliancanaj armeanoj restis en Romo dum jaroj, do rilatoj sendube estis. Inter la liberigantoj/okupaciantoj estis ankaŭ pola korpuso, kaj ekestis geedziĝoj inter poloj kaj italinoj (eble ankaŭ aliaj); kiam mi kaj la familio iris al la UK en Varsovio en 1959 iuj el tiuj virinoj, sciante ke en la kongreso estas italoj, venis serĉi nian familion kaj rakontis pri sia odiseado: malgraŭ la senduba amo kun la edzo, tamen ili statis malbone, ĉar la vivnivelo en Pollando tiam estis multe pli malalta ol tiu je kiu ili vivis en Italio.

***Ĉu "Ni" signifas "nia familio", "la esperantistoj en Romo" aŭ ĝenerale "la romanoj/italoj"?***

La esperantista sento estis ĉiam supera al eventualaj politikaj diverĝoj aŭ uniformaj malsamecoj, do la ligilo estis inter ni, kiel familianoj kaj romanoj, kaj la eksterlandaj soldatoj. Tre verŝajne tio eĉ pli estis sentata en norda Italio, ĉar tie la partizanoj multe pli aktive agadis, kaj la reprezalioj far la germanoj estis ege kruelaj. Kiel verŝajne en ĉiu milito, ĉiuj post ĝia fino deklaras, ke ili ĉiam estis almenaŭ spirite ĉe la flanko de la venkintoj kaj apogis faŝismon nur ĉar devigataj.

***Laŭ via memoro kiam finiĝis efektive la milito? Ĉu la esperantista agado tuj rekomenciĝis?***

Finon de la milito mi ne perceptis tuj, ĉar post la mezo de 1944 la fronto iris norden, en Romo bataloj ne okazis, kaj razioj ne plu. La esperantista agado tute ĉesis dum la milito, ankaŭ ĉar la milito daŭris dum unu plena jaro kaj duono sur la itala teritorio kaj komunikoj inter la du kontraŭaj flankoj de la fronto estis malebligitaj. La agado revekiĝis post 1945, en Romo ree okazis kursoj ĉe la popola universitato, mia patro verkis litografiitan gramatikon en 12 lecionoj; Itala E-Federacio oficiale neniam estingiĝis, sed la prezidanto, markizo Carlo Cordero di Montezemolo, estis mortinta en 1943; la unua kongreso estis organizita en 1947 en Torino.

***Kiu organizis tiun kongreson?***

La kongreso de Torino estis organizita de socialisto Mario Guzzi, mi ne scias, ĉu oficiala SATano, kiu redaktis la etan bultenon *Verda Steleto*, kiu ne estis ligita al la Itala Federacio.

***Ĉu vi scias ĉu estis ideologiaj debatoj en la tiutempa itala movado? Ĉu socialistoj kaj ekssimpatiantoj de faŝismo kunlaboris senprobleme? Kiun rolon ludis la katolikoj en tiuj debatoj/agado?***

Mi opinias, ke oni parolis nur por restarigi nefunkciantan organizon. Parenteze dirite, la Esperanto-Centro en Milano estis detruita de anglaj bomboj, do jam estis problemo kie instali la sidejon, kiu poste instaliĝis en Torino. La E-movado en Italio estis, kun malmultaj esceptoj, burĝa-katolika, do ĉefe regis la *embrassons-nous*[1] ĝenerala kun flankenmeto de politikaj malsamecoj; persistan kontraŭkatolikismon mi neniam perceptis, kvankam ja ne ĉiuj iris al la E-kongresaj mesoj. Sed, honeste dirite, neniam elstaris en la itala tiutempa [postmilita] movado komunistoj ligitaj al la moskva aŭ pekina ideologio, kiel en aliaj landoj; izoluloj ekzistis jes ja, sed, koncerne esperanton, pacemaj. Kvankam mi iris al ĉiuj italaj kongresoj ekde 1951 ĝis 1966 (poste al multaj aliaj, sed sporade), mi neniam aŭdis diskutojn pri politiko aŭ kverelojn inter samideanoj kun malsamaj politikaj tendencoj.

***Ĉu vi mem partoprenis la kongreson de Torino en 1947?***

Ĝi estis nia unua kongreso, mia frato kaj mi oficiale salutis, mia frato nome de Denaska Esperantistaro, mi nome de iu stenografia instituto en Romo: granda aplaŭdado, mi estis nur sepjara, do eble mia unua "sukceso kiel oratoro". La etoso estis la entuziasmo de retroviĝo post grandaj suferoj kaj disiĝoj. Mi ne kapablas diri, ĉu oni specife parolis pri milito, certe oni parolis pri la reorganiziĝo de la itala movado; mi supozas, ke ĝuste tiam prof-ro Giorgio Canuto fariĝis prezidanto de IEF kaj mia patro fariĝis estrarano, kio daŭris dekkelkon da jaroj (Canuto mortis en 1960). En 1950 ree aperis la nacia revuo.

***Ĉu la nacia revuo estis tute neŭtrala? Kion signifis neŭtraleco en la tuj postmilita periodo?***

La "neŭtraleco" de la itala movado estis (kaj ankoraŭ nun estas) la burĝa neŭtraleco konsistanta el "ni ne parolas pri (partia) politiko", kaj la samideaneco ("ni disvastigu esperanton") estis ĉiam interligilo supera al ĉio. Ĉar kontraŭ faŝismo ĉefe agis kaŝe komunistoj el la stalina linio, tuj post la milito estis forta timo, ke la itala parlamento, unuafoje elektenda post dudek jaroj da neelekto dum la faŝisma diktaturo, estos altprocente komunista kaj estos grava risko de ŝtatrenverso kiel en landoj de Orienta Eŭropo (certe la usonaj trupoj establitaj en Italio ne

1 Franclingve en la teksto: ni interbrakumu.

estus permesintaj ion tian); sed la elektoj en 1948 metis Italion en la manojn de la kristandemokrata partio, kiu ĝin regis seninterrompe, sola aŭ kun minoritataj aliancanoj, dum 45 jaroj; en ĉi tiu ne-ekstremisma ekvilibro esperantismo kunfluis kaj daŭre flosas.

***En 1950 okazis aparta esperanta agado. Kion vi memoras pri aliaj eventoj en tiu jaro? Ĉu la vivo en la tiutempa Romo permesis al vi ĝui ilin?***

Tiujare estis ankaŭ la IKUE-kongreso en Romo (IKUE ĉiam estis forta en Romo) kaj renaskiĝis la radiodissendoj de Radio Roma sub la egido de la ĉefministro, ĉi-foje kun larĝa sendependo de la redaktoroj; eĉ kiam temis pri novaĵoj el Italujo, la redaktoroj mem devis verki la tekston, kompreneble ne eksplicite kontraŭ la registaro, sed neniam estis tuŝita la politiko, kaj neniam estis enmiksiĝo far ŝtataj aŭtoritatuloj.

Romo ne tro multe suferis pro la milito, ĉar ĝi estis deklarita "*aperta*", tamen ĝi estis bombita plurfoje; la manĝaĵoj estis ne ĉiam bonaj (ladskatoloj de la usona armeo), sed malsaton mi neniam suferis; ja, la tramoj estis plenplenaj; pluraj lernejoj (ankaŭ la mia) estis okupitaj de rifuĝintoj el malpli bonŝancaj lokoj, tiel mi dum mia tuta bazlerneja tempo iris al alia lernejo preskaŭ unu horon malproksima, en la posttagmeza vico. Sed fakte nur tio influis mian vivon, al la lernejo mi iris sesjara, infanvartejon mi ne konis, do estis jam 1946.

***Kiam vi konsciiĝis pri la malvarma milito?***

La malvarman militon mi prikonsciis preskaŭ tuj. La ŝtatrenversoj en la orienteŭropaj landoj kaŭzis fortan elmigradon okcidenten, kaj iuj esperantistaj rifuĝintoj gastis kelktempe ĉe ni (la provizoraj akceptaj centroj en Romo estis superŝutitaj de rifuĝintoj); unu rumanino poste migris al Kanado (ŝi fariĝis honora membro de UEA), alia paro hungara-estona al Nov-Zelando, ni renkontiĝis plurajn jarojn poste ĉe iu UK. Mia unua UK estis en 1951 en Munkeno, ankoraŭ tute detruita; el orienteŭropaj landoj venis absolute neniu.

***Ĉu la primilitaj temoj aperis tiam en programeroj, debatoj, ne-formalaj konversacioj ktp?***

Mi ne memoras tion, sed mi estis nur dekunujara; mi memoras, ke ni tostis en bierejo kie okazis la hitlera "puĉo de la bierejo" en 1923, kaj oni ja klarigis al mi pri kiu evento temis. En tiu UK mia frato gajnis la oratoran konkurson, sed certe pri neŭtrala temo. Retrorigarde, en la UK

de 1947 en Berno Ivo Lapenna proponis rezolucion kiu kondamnis, tute ĝenerale, la esperantistojn kiuj kapablis "kunigi la verdan stelon kun la hokokruco", sed ĝi estis malakceptita, por ne rompi la intersamideanan solidarecon.

***Ĉu okazis konfliktoj inter esperantistoj el malsamaj landoj?***

En 1953 estis fortega tensio inter Italio kaj Jugoslavio pro la situacio de Triesto, kie ankoraŭ okupaciantaj britaj trupoj klopodis, sen granda sukceso, ekvilibrigi la malkonkordojn inter la du ŝtatoj, kiuj ja memoris pri reciprokaj kruelaĵoj: faritaj de italoj kiam ili konkeris Slovenion, kaj de komunistaj partizanoj kiuj dum kvardeko da tagoj estis mastroj de Triesto. Ricevi vizon al Jugoslavio estis por italoj tre malfacile, sed pro la UK en Zagrebo ni ricevis ene de malmultaj tagoj. Kaj mi memoras la vere fratan akcepton fare de la jugoslaviaj samideanoj, malgraŭ la malsamaj vidpunktoj pri la tensio pro Triesto: la esperantista etoso estis super ĉio.

***Interesas nin scii ankaŭ kiel esperantistoj rakontas la militon. Ĉu eble John Francis, Julius Balbin kaj la posta tre diversa kontribuo de Trevor Steele markas periodojn aŭ nur malsimilajn alirojn?***

Krom tiuj aluditaj estas tuta amaso da aliaj verkoj. Ĉiu rakontas sian aventuron kaj aldonas sian juĝon. La postmilita [Georges E.] Maura poezias pri la enkarceriĝo de [Gaston] Waringhien, japanoj unuaj, malgraŭ la malpermeso de la usonaj aŭtoritatoj tiam ankoraŭ okupaciantaj Japanion, publikigis "Viktimoj de l' atombombo" kaj "Infanoj de l' atombombo", kun bildoj harhirtigaj. Pri la persekuto al judoj aŭ al normalaj civitanoj rakontas [Julius] Balbin, [Leendert] Deij, [Kálmán] Kalocsay, [Petr] Ginz, [Tivadar] Ŝvarc/Soros, Raymond Schwartz, [Mikaelo] Bronŝtejn, [Edwin] de Kock, [Poul] Thorsen, [Johan Hammond] Rosbach, [Jozef] Kohen-Cedek en *Malgranda Revuo* (ankoraŭ dummilite), [Oton] Pancer, [Jaume] Grau Casas (en franca koncentrejo post la hispana intercivitana milito), Clelia Conterno (kies edzo estis internigita en germana koncentrejo). Tia demando postulus plenajn kaj profundajn eseojn. Ĝenerale dirite: certe temas pri malsamaj periodoj, do pri malsamaj aliroj. Paroli pri milito kiam ĝi estas ankoraŭ proksima estas unu afero (Grau Casas, Ginz, Balbin, Auld, Kalocsay, [Julio] Baghy kaj aliaj), paroli pri ĝi jardekojn poste ([Trevor] Steele, Bronŝtejn, Raymond Schwartz, [John] Francis), kiam intertempe memoroj fadiĝis kaj enŝoviĝis tuta aro da aliaj militetoj kaj la mondo estas tre malsama ol tiu, kiun lasis ĵus finiĝinta milito, estas alia.